

La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache. | Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Eldonata unu fojon en la monato de L. Zamenhof.

Kosto por $\frac{1}{2}$ jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 markoj 30 pfenigoj. (Por Rusujo — 1 rublo, por ĉiuj ceteraj landoj — 3 frankoj.) Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto (de ĉia lando), sed en tia okazo oni devas sendi per 20% pli multe ol la kosto nominala. Anoncoj po 1 marko por $\frac{1}{32}$ de la paĝo.

Ĉio tuŝanta la gazeton „La Esperantisto“ (kiel ekzemple leteroj, artikoloj, pago por la abonado k. c.) devas esti sendata al L. Zamenhof. (Adreso: Dr. L. Zamenhof à Varsovie, Russie).

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nurnbergo.

Nr. 10.

Nurnbergo, Oktobro 1890.

Jaro 1.

Al la legantoj.

De la nuna numero la „Esperantisto“ transiras plene sub la kondukadon de L. Zamenhof. Ni esperas, ke la legantoj konservos por nia gazeto en ĝia denuna eldonado la favoron, kiun ili montris por ĝi ĝis nun. Ni ĉiam penados, kiom ni nur povos, ke la legantoj restu kontentaj, kaj ni esperas, ke ili ankaŭ de sia flanko prezentos al ni volonte helpan manon kaj donos al ni la eblon ĉiam pli bonigi kaj perfektigi nian gazeton kaj kun ĝi ankaŭ nian aferon, de kiu ĝi estas la organo kaj kondukanto. Ne mankas al ni bona volo, ne mankas al ni pacienco kaj oferemeco, ne mankas al ni energio, ne mankas al ni espero. Tra baroj kaj malhelpoj ni gaje ĉiam paŝados al la celo, kiu lumas al ni en la plej roza koloro. Sed ne sufiĉe granda ankoraŭ estas nia forto por ke ni povu jam ĉion fari tiel rapide kaj brilante, kiel ni kaj niaj legantoj volus. Paŝo post paŝo ni perfektigados nian gazeton, sed por ĉio estas necesa pacienco kaj tempo. „Ne en unu tago Romo estis konstruita“, — tion ni memorigas precipe al tiuj legantoj, kiuj eble atendas, ke sub la nova kondukado nia gazeto per unu fojo fariĝos granda kaj potenca. Sed, se eĉ ne tre rapide, nia gazeto tamen ĉiam perfektigados kaj grandigados, — la rapideco de tiu ĉi perfektigado dependas de la mezuro de helpo de la flanko de la legantoj.

Ni komencas de tio, ke ni penos reenkonduki plenan regulecon en la elirado de la numeroj. Pro diversaj malhelpoj la elirado de la numeroj iom post iom forte malfruiĝis, tiel ke ekzemple nun la numero Julia eliras ne pli frue ol en Oktobro. Por ne fari konfuzon en la ordo de la abonado, la nuna numero portas en la titolo la daton de Julio; sed jam post 2 semajnoj eliros la numero Aŭgusta kaj poste en intertempoj dusemajnaj elirados la sekvantaj numeroj, tiel ke laŭ nia espero ĝis Januaro la siatempeco de la numeroj estos tute reenkondukita, kaj tiam la gazeto jam elirados regule en la komenco de ĉiu monato.

La dua punkto, kiun ni havas antaŭ la okuloj, estas la pliigado de la grandeco de nia gazeto, kiu estas nun ankoraŭ tre malgranda kaj tre malofte eliranta folieto. Penante antaŭ ĉio reenkonduki plenan siatempecon en la elirado de la numeroj, ni nun ne povas ankoraŭ tuj fari ion en alia direkto; sed jam post tri monatoj, t. e. de Januaro 1891, la grandeco de nia gazeto estos duobligita, t. e. por tiu sama pago la abonantoj ricevados ĉiumonate anstataŭ duono da folio — tutan folion de 8 paĝoj. Multaj legantoj deziras, ke ni turnu nian gazeton el ĉiumonata en ĉiusemajnan; ĝi estas ankaŭ nia propra deziro, sed pri tio ĉi ni havas ankoraŭ la okazon paroli iam poste.

Novajo, kiun ni enkondukas en nian gazeton jam, nun estas tio, ke ni presados en la gazeto (kiel aparta aldono) la nomojn de ĉiuj abonantoj; ni faras ĝin por tio, ke ĉiuj veraj amikoj de nia afero, kiuj efektive laboras super nia lingvo, perfektigas en ĝia uzado kaj subtenas ĝian progresadon materiale, sciuj unu pri la alia. Per tio ĉi ni plenumas la deziron de multaj amikoj de nia afero, kiuj vidas en nia gazeto antaŭ ĉio rimedon por interkomunikigi inter si la verajn amikojn de nia afero. Ĉar laŭ la malnova ordo multaj jam abonis antaŭe por unu kvaronjaro, ni donos en la komenco la nomaron de la abonantoj por ĉiu $\frac{1}{4}$ jaro aparte (en la fino de la $\frac{1}{4}$ jaro); sed jam de Januaro 1891 ni akceptados abonon nur tutjaran; kaj tiam ni ankaŭ la nomaron donados nur unu fojon en jaro.

Estus tute superflue paroli pri la granda signifo, kiun la „Esperantisto“ havas por nia afero. Tial ni varmege rekomendas la sorton de nia gazeto al ĉiuj veraj amikoj de nia afero, petante ilin zorgi, kiom ili povas, pri la konstanta kresko de la nombro de l' abonantoj. Ankaŭ pri helpo morala kaj pri pli viva kunlaborado ni petas niajn amikojn. Sed estus al ni tre agrable, se tiu ĉi kunlaborado konsistus ne en alsendado de amasoj da tradukitaj rakontoj, sed en alportado de aferoj originalaj kaj interesaj, kiel ekzemple korespondoj, sciigoj, novaĵoj, utilaj projektoj aŭ interesaj opinioj k. c. Persono, sendanta tian materialon, ne devas multe zorgi pri la pureco kaj eleganteco de la lingvo kaj stilo, ĉar pri tio ĉi ni jam volonte zorgos mem; sed el la amase ricevataj tradukitaj rakontoj, kiuj havas por la legantoj intereson nur kiel ekzerco en la lingvo, ni kompreneble povas elekti kaj uzi nur tiujn, kiuj estas skribitaj per eleganta kaj tute pura stilo; ĉar se ni volus perdi tempon por korektado de malglataj tradukoj, ni ja povus ĝin multe pli utile uzi farante mem tradukojn.

Ĉio tuŝanta nian gazeton (kiel ekzemple leteroj, artikoloj, mono k. c.) devas de nun esti sendata al L. Zamenhof. Rekomendante la sorton de nia gazeto ankoraŭ unu fojon al la amikoj de nia afero, ni komencas nian laboradon kun la plej bonaj esperoj je la estonteco. Fratan internacian saluton al ĉiuj niaj amikoj!

La redakcio.

Leopoldo Einstein.

Antaŭ kelkaj semajnoj mortis en Nurnbergo post longa kaj malfacila suferado sinjoro Leopoldo Einstein, unu el la plej varmaj kaj energiaj amikoj de nia afero, la aŭtoro de la

verkoj „La Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems“, „Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen“ kaj diversaj artikoloj en germanaj gazetoj. La mortinto estis la unua, kiu donis antaŭpuŝon al nia afero en Germanujo. Ĝis nia lingvo estis publikigita, la mortinto estis varmega Volapükisto, batalis por Volapük kun fervoro kaj energio kaj tre multe helpis al la vastiĝo de tiu lingvo*). Jam de la komenco li sentis la tutan malfortecon de la Volapüka vortaro, sed, ne esperante, ke tiu ĉi demando estus iam solvita pli bone, kaj vidante, ke la diversaj novaj proponataj sistemoj estas nur efemeraj ne pripensitaj provoj, kiuj volas detrui Volapükon, sed donas nenion pli bonan, li daŭrigis sian fervoran laboradon kaj batalis kontraŭ ĉiu nova propono. Sed ricevinte antaŭ 2 jaroj okaze la unuan lernolibron de nia lingvo kaj la „Duan Libron“, li tute ŝanĝiĝis. Malgraŭ sia aĝo (li havis tiam 54 jarojn) li en la daŭro de kelkaj tagoj perfekte ellernis nian lingvon kaj fariĝis ĝia varmega amiko. „La demando de lingvo tutmonda“, li skribis al ni kelkan tempon poste, „estas fine absolute solvita, kaj ĝoje mi sendas al Vi koran gratulon al tiu ĉi solvo. Kion mi longe atendis, fine venis. Laborante por Volapük, mi diris al mi, ke la unu duono de tiu ĉi lingvo (la gramatiko) estas bona, sed la dua duono (la vortaro) estas malbona; sed mi timis, ke nenio povas esti perfekta kaj unu parto devas suferi je la kosto de la dua. Sed en la „Internacia“ la unu parto kaj la dua estas solvitaj la plej bone, kaj tial mi ekkrias kun plena certeco: „la demando de lingvo tutmonda estas fine absolute solvita!“ Ĉar neniam povos esti kreita gramatiko pli simpla, ol en la „Internacia“, kaj nenia vortaro de lingvo tutmonda povas esti konstruita sur aliaj principoj, ol la vortaro de la „Internacia“. Se en la „Internacia“ estos eble trovitaj kelkaj eraroj, ili estos nur malgrandaj, kiuj kun la tempo facile povos esti bonigitaj sen bezono rompi la sistemon. Kia ajn estos la estonta „lingvo de l' mondo“, estas tute sendube, ke ĝi povas esti nur la „Internacia“, aŭ en ĝia nuna formo, aŭ en formo iom ŝanĝita, nur en detaloj, sed ne en la fundamento. Alia fundamento estas neebla, kaj tial mi nun povas tute trankvile labori, ne timante jam ke mi devos iam defali de la sistemo.“ Jam 8 semajnojn post la aliĝo de Einstein eliris prese lia verko „La Lingvo Internacia als beste Lösung des Internationalen Weltsprache-Problems“, kiu elvokis konfuzon inter la Volapükistoj kaj alportis al la aŭtoro grandan persekuton de ilia flanko. Ne povante respondi ion gravan kontraŭ la verko de Einstein, ili komencis batali kontraŭ li per la plej sentaktaj personaj atakoj kaj insultoj. Ne timigite de la atakoj, la mortinto daŭrigis energie bataladi; per vasta korespondado kaj dissendaĵo de verkoj li serĉis amikojn por nia afero, kiom kaj kie li povis, kaj jam kelkajn monatojn post lia unua verko eliris lia verko polemika „Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen“. Li havis la intencon komenci vastan sisteman agitadon per publikaj legadoj en diversaj urboj; sed bedaŭrinde la sorto ne permesis al li tion ĉi fari: malfacila malsano alforĝis lin baldaŭ al la ĉambro, doloroj kaj suferoj ne permesis al li pli labori. Eĉ sian korespondadon li estis devigita preskaŭ tute ĉesigi kaj nur al ni li de tempo al tempo ankoraŭ skribadis leterojn plenajn je entuziasma fajro; tra la suferoj de maljunulo brilis la idealaj flamoj de junulo. Inter la plej grandaj korpaj suferoj li ne forgesis nian aferon kaj, ne povante jam labori por ĝi, li ĉiam songis kaj revis pri ĝi. En la komenco li havis ankoraŭ esperon, ke li resaniĝos, kaj li ofte skribadis al ni pri siaj planoj por la estonteco, pri la intencataj legadoj pri nia afero k. c., sed en la vasta duonjaro li perdis la esperon kaj skribis al ni, ke li

senpacience atendas, ke la bonfara morto lin liberigu de liaj suferoj. Havante jam por si mem nenian esperon, li skribis al ni antaŭ kelkaj monatoj: „mi estas maljuna kaj malsana kaj ne vidos jam la venkon de nia sankta bela afero, sed Vi ĝin vidos baldaŭ, baldaŭ en ĝia tuta beleco. Se eĉ pasos kelka nombro da jaroj en malfacila batalado, ne perdu la kuragon kaj laboru. Antaŭ ol nia centjaro finiĝos, nia afero venkos, kaj la kuragaj konstantaj batalantoj havos dolĉan rekompencan.“ Skribante pri la malvarma printempo, kiu malhelpis lin uzi freŝan aeron, li aldonis: „la vintro ne volas foriri kaj obstine batalas kontraŭ la alvenanta somero; sed malgraŭ la nuboj kaj frostoj la somero baldaŭ venkos. Tiel ankaŭ pasantaj malfacilaĵoj povas malrapidigi por kelka tempo la iradon de nia afero, sed neniam nuboj kaj frostoj povas reteni ĝian finan venkon“. Ankoraŭ en la mezo de Aŭgusto ni ricevis de li leteron, skribitan per laca mano, kaj en la komenco de Septembro ni ricevis la malĝojan sciigon pri lia morto. Paco al Via cindro, nia kara frato kaj kunbatalanto!

La virineto de l' maro.

(Daŭrigo.)

Sed jen la reĝido devis edziĝi kaj ricevi kiel edzinon la filinon de la najbara reĝo; tial oni pretigis tian belan ŝipon. La reĝido veturas, oni diras, por ekkoni la landojn de la najbara reĝo, sed efektive ĝi estas farata por rigardi la filinon de la najbara reĝo; grandan sekvantaron li devis kunpreni. La virineto de l' maro balancis la kapeton kaj ridetis; ŝi konis la pensojn de la reĝido pli bone ol ĉiuj aliaj. „Mi devas veturi!“ li diris al ŝi, „mi devas rigardi la belan reĝidinojn; miaj gepatroj ĝin postulas, sed por preni ĝin kiel fianĉino, tion ili ne volas min devigi. Mi ne povas ŝin ami! ŝi ne estas simila je la bela knabino en la preĝejo, je kiu vi estas simila. Se mi iam devus elekti fianĉinon, tiam la elekto pli volonte falus sur vin, mia muta trovitineto kun la parolantaj okuloj!“ Ĉe tio li ŝin kisis sur ŝia ruĝa buŝo, ludis kun ŝiaj longaj haroj kaj metis sian kapon al ŝia koro, kaj pli vive ŝi ekrevis pri homa feliĉo kaj pri senmorta animo.

„Vi ja ne timas la maron, vi muta infano?“ li demandis, kiam ili staris sur la belega ŝipo, kiu devis lin veturigi al la lando de la najbara reĝo, kaj li rakontis al ŝi pri ventegoj kaj senventeco, pri mirindaj fiŝoj en la profundaĵo kaj kion la subakvigistoj tie vidis, kaj ŝi ridis ĉe lia rakontado, ĉar ŝi sciis ja pli bone ol ĉiu alia pri la fundo de l' maro.

En luna nokto, kiam ĉiuj dormis, krom la direktilisto apud sia direktilo, tiam ŝi sidis sur la rando de l' ŝipo kaj senmove rigardis malsupren tra la klara akvo, kaj ŝajnis al ŝi, kvazaŭ ŝi vidas la palacon de sia patro; sur la plej alta turo de tiu palaco staris la maljuna avino kun la argenta krono sur la kapo kaj rigardadis sendeturniĝe tra la ondanta akvo al la kilo de l' ŝipo. Jen ŝiaj fratinoj elnaĝis el la internaĵo de l' maro, rigardadis ŝin malgaje kaj kunerompadis la blankajn manojn. Ŝi faris al ili signojn, ridetis kaj volis rakonti, ke ĉio iras bone kaj feliĉe, sed la servanto de l' ŝipo alproksimiĝis al ŝi kaj la fratinoj subakvigis, tiel ke li pensis, ke la blanka, kion li vidis, estis nur ŝaŭmo sur la maro.

Je la sekvanta mateno la ŝipo ennaĝis en la havenon de la belega ĉefurbo de la najbara reĝo. Ĉiuj sonoriloj de preĝejoj sonoris, kaj de la altaj turoj eksonis trumpetoj, dum la soldatoj kun etenditaj standardoj kaj brilantaj bajonetoj staris orditaj en parado. Ĉiu tago estis pasigata feste. Baloj kaj kolektiĝoj sekvis unu la alian, sed la reĝidino ankoraŭ ne estis, ŝi estis edukata, kiel oni diris, malproksime en unu

* El la laboroj de Einstein de tiu tempo la plej interesa estas lia vasta historia artikolo: „Zur Geschichte der Weltsprachlichen Versuche von Leibnitz bis auf die Gegenwart“, presita en la „Bayerische Lehrzeitung“ N.Nr. 11 kaj 12, 1885.

† Vudu alian tradukon en „Esperantisto“ 1975, p. 11.

sankta monaĥejo, kie ŝi lernadis ĉiujn reĝajn virtojn. Fine ŝi alveturis.

La virineto de l' maro brulis de deziro vidi ŝian belecon kaj devis konfesi, ke personon pli belan kaj ĉarman ŝi neniam ankoraŭ vidis. Ŝia haŭto estis delikata kaj travidebla kaj post la longaj mallumaj okulharoj ridetis paro da nigrablujaj fidelaj okuloj.

"Vi ĝi estas!" ĝoje ekkriis la reĝido, "vi, kiu min savis, kiam mi kuŝis malviva sur la bordo de l' maro!" kaj li premis ŝin kiel sia ruĝiganta fianĉino en siaj brakoj. "Ho, mi estas tro feliĉa," li diris al la virineto de l' maro. "La plej bona, kiun mi neniam esperis atingi, estas al mi plenumita. Vi ĝojos je mia feliĉo, ĉar vi min amas la plej multe!" La virineto de l' maro kisis al li la manon, kaj jam nun estis al ŝi, kiel ŝi sentus, ke ŝia koro disŝirigis. La mateno de la edziĝo de l' princo devis ja alporti al ĝi la morton kaj turni ŝin en ŝaŭmon sur la maro.

Ĉiuj sonoriloj de la preĝejoj sonadis, la heroldoj rajdadis tra la tuta urbo kaj sciigadis la fianĉigon. Sur ĉiuj altaroj brulis bonodora oleo en multekostaj arĝentaj lampoj. La pastroj balancadis la fumilojn kaj la gefianĉoj donis unu al la alia la manon kaj ricevis la benon de l' episkopo. La virineto de l' maro staris en silko kaj oro kaj tenis la trenejon de l' vesto de la fianĉino, sed ŝia orelo ne aŭdis la festan muzikon, ŝia okulo ne vidis la sanktan ceremonion, ŝi pensis pri sia nokto de l' morto, pensis pri ĉio, kion ĝi perdis en tiu ĉi mondo.

Ankoraŭ en tiu sama vespero la gefianĉoj iris sur la ŝipon; la paflegoj tondris, ĉiuj flagoj sin movadis en la aero, kaj en la mezo de la ŝipo estis konstruita reĝa tendo el oro kaj purpuro kaj provizita je la plej belaj kusenoj, sur kiuj devis ripozi la gefianĉoj en la trankvila malvarmeta nokto.

La vento blovis la velojn kaj la ŝipo glitis facile kaj sen forta ŝanceliĝado sur la klara maro. Kiam fariĝis vespero, oni ekbruligis kolorajn lampojn kaj la maristoj dancis gajajn dancojn sur la ferdeko. La virineto de l' maro tiam ekmemoris tiun vesperon, kiam ŝi je l' unua fojo suprennaĝis el la maro kaj vidis tian saman belececon kaj ĝojon, kaj nun ŝi sin turnadis en la danco, flugetante kiel flugetas la hirundo, kiam ĝi estas persekutata, kaj ĉiuj admirante aplaudadis al ŝi, neniam ankoraŭ ŝi dancis tiel belege. Kiel per akraj tranĉiloj tranĉadis en ŝiaj delikataj piedoj, sed ŝi ĝin ne sentadis, ĉar pli multe ĝi tranĉadis al ŝi la koron. Ŝi sciis, ke ĝi estas la lasta vespero ke ŝi lin vidas, lin, por kiu ŝi forlasis la amikojn kaj hejmon, fordonis sian belegan voĉon kaj ĉiutage suferadis malfacilajn dolorojn, dum li ĝin eĉ la plej malmulte ne scietis. Ĝi estis la lasta nokto, ke ŝi enspiradis tiun saman aeron, kiel li, kaj vidadis la profundan maron kaj la bluan stelan ĉielon. Eterna nokto sen pensado kaj songado ŝin atendis, ĉar ŝi ne havis animon kaj jam neniam povis ĝin ricevi. Ĉio sur la ŝipo estis plena je ĝojo kaj gajeco, multe ankoraŭ post la mezo de l' nokto; ŝi ridetadis kaj dancadis kun pensoj de morto en sia koro. La reĝido kisis sian belan fianĉinon kaj ŝi ludis kun liaj nigraj haroj kaj brako en brako ili iris en la belegan tendon por ripozi.

Fariĝis trankvile kaj mallaŭte sur la ŝipo, nur la direktistilo staris apud la direktilo; la virineto de l' maro metis siajn blankajn, brakojn sur la randon de l' ŝipo kaj rigardadis al oriento atendante la ĉielruĝon de mateno. Ŝi sciis, ke la unua radio de l' suno estos ŝia alportanto de morto. Tiam ŝi ekvidis siajn fratinojn levigantajn el la maro, ili estis palaj kiel ŝi mem, iliaj longaj belaj haroj jam ne movadis sin en la vento, ili estis detranĉitaj.

"Ni donis ĝin al la sorĉistino, por ke ŝi donu helpon kaj por ke vi ne devu morti en tiu ĉi nokto! Ŝi donis al ni tranĉilon, jen ĝi estas! Vi vidas, kiel akra ĝi estas?"

Antaŭ ol la suno levigos, vi devas ĝin enpuŝi en la koron de la reĝido, kaj kiam lia varma sango ŝprucos sur viajn piedojn, tiam viaj piedoj kunkreskiĝos en unu fiŝan voston kaj vi denove fariĝos virineto de l' maro, vi povos veni al ni en la maron kaj vivi viajn tricent jarojn, antaŭ ol vi fariĝos malviva sala ŝaŭmo de l' maro. Rapidu, rapidu! Li aŭ vi devas morti antaŭ la levigo de l' suno. Nia maljuna avino malĝojas tiel, ke la blankaj haroj al ŝi elfalis, kiel niaj falis sub la tondilo de la sorĉistino. Mortigu la reĝidon kaj revenu! Rapidu! ĉu vi vidas la ruĝan strion sur la ĉielo? Post kelkaj minutoj levigos la suno kaj vi devos morti!" Kaj ili strange kaj profunde ekĝemis kaj malleviĝis en la akvon.

(Fino venos.)

Novajĵoj.

Por la celoj de nia afero (por uzi laŭ sia persona opinio) L. Zamenhof ricevis la sekvantajn oferojn: de d-ro Guminski en Rovnoje — 20 milrejsajn Brazilajn; de s-ro Molgaĉev en Samara — 3 rublojn. Ni esprimas nian dankon al la estimataj oferantoj; pri la maniero de uzado de tiu ĉi mono ni sciigos en unu el la venontaj numeroj de la „Esperantisto“.

La 15^{an} de Septembro sinjoro Chr. Schmidt havis en Sonneberg publikan paroladon pri nia afero. Li parolis pri la historio de la ideo kaj pri ĝia signifo kaj akompanis sian paroladon per praktikaj provoj, montrante la eksterordinare facilan ellerneblecon de nia lingvo, ĝian kompreneblecon tute sen prepariĝo kaj la manieron de ĝia uzado kun personoj, kiuj tute ĝin ankoraŭ ne konas kaj ankaŭ ne konas aliajn lingvojn ekster sia propra. La konvinka parolado kaj la praktikaj provoj havis tre bonan sukceson kaj alportis al nia afero multajn novajn amikojn.

Sinjoro M. S. Bogdanov el Sofio skribas al ni, ke astataŭ la „Mondlingvisto“ li nun komencas la eldonadon de nova gazeto en nia lingvo sub la titolo „Espero“. Kiu volas ricevi la provan numeron, estas petata sin turni al la redaktoro sub la adreso: „M. S. Bogdanov en Sofio (Bulgarujo)“.

La plej gravan utilon al nia afero alportas tiuj, kiuj skribas pri ĝi artikolojn en gazetoj. Por ke la indifera amaso aliĝu al nia afero, estas necese antaŭ ĉio, ke oni ofte ripetadu al ĝi la aferon en gazetoj en diversaj formoj, bone konatigante la publikon kun la signifo de nia lingvo, kun ĝia konstruo, ekscitante ĝin por la grava ĉiuhoma afero, elvokante ĝian respekton por la sukcesoj de tiu ĉi afero k. c. Al la skribantoj de artikoloj kaj ankaŭ al la aliaj amikoj ni estos tre dankaj, se ili volos alsendi al ni unu ekzempleron de ĉiu gazeto, en kiu estas parolata pri nia afero. Pri ĉiu tia artikolo ni akurate sciigos en nia gazeto. En la lasta tempo ni ricevis la sekvantajn gazetojn kun artikoloj pri nia afero; „Saratovskij Dnjevnik“ (2 artikoloj de A. G. Filippov), „Okrajna“ (korespondo pri nia afero de V. V. Majnov), „Kolosja“ (artikolo de A. Zinovjev), „Coburger Tageblatt“ (korespondo pri la legado de Chr. Schmidt).

En la lasta tempo estis eldonitaj la sekvantaj verkoj pri nia afero: „Kondukanto internacia“ de A. Grabowski; „Uplná učebnice mezinárodní reči dra. Esperanta“ (Lernolibro de la lingvo Esperanto por Bohemoj) de Fr. Vl. Lorenc; „Meždunarodnij jazik Esperanto“ (Pri la konstruo kaj la signifo de la lingvo Esperanto) de Zinovjev; „Sefer Hamilim“ (vortareto hebrea-Esperanta) de Gureviĉ.

Respondoj al la amikoj.

Pri la „Respondoj al la amikoj“. Ni rekomendas al la legantoj la rubrikon „Respondoj“. La Respondoj ne havas karakteron personan (ĉar personajn respondojn ni donas per leteroj), sed ĉiu respondo povas ĉiam ekster la adreso havi intereson ankaŭ por aliaj legantoj.

Al s-ro B. en Moskvo. Pri la „Ligo de Esperantistoj“ kaj pri mia rilato al ĝi mi donos artikolon en unu el la venontaj numeroj. La Regularo estis efektive verkita de mi; sed, danke unu eraron en la tempo de la presado, la Regularo akceptis tute alian formon ol mi pensis. Kelkaj punktoj en mia Regularo ŝajnis al la klubo Nurnberga ne bonaj, kaj, ne havante la eblon konsiliĝi kun mi pri tiuj ĉi punktoj, la klubo ŝanĝis la direktajn punktojn laŭ sia propra opinio. Kvankam la intencoj de la klubo estis bonaj kaj la ŝanĝoj ŝajnis tre malgrandaj kaj malgravaj, tamen efektive ili donis al la Regularo tute alian karakteron, ol ĝi devis havi. La afero estos klarigita kaj rebonigita en la venontaj numeroj. — Legante iajoje en la „Esperantisto“ artikolojn kun proponoj de diversaj ŝanĝoj en nia lingvo, Vi tute vane timas, ke ni jam havas la intencon fari facilanime rompojn kaj ŝanĝojn en la lingvo. Vi povas esti tute certa, ke antaŭ ol ni decidiĝos fari ĉian eĉ la plej malgrandan ŝanĝon en la lingvo, ni ĝin longe kaj bone preparolos kaj prijuĝos publike, kaj ia ŝanĝo estos farita nur tiam, se ĝi montriĝos efektive necesa kaj se ĝi post matura preparolado estos akceptita de ĉiuj amikoj sen disputo kaj sen malordo. La artikoloj kun proponoj de ŝanĝoj, kiujn ni iajoje presas (kvankam la plej grandan parton de ili ni persone tute ne povas aprobi), ne havas ankoraŭ ian signifon praktikan, — ili estas nur teoriaj preparoj, por ke iom post iom montriĝu, kiaj ŝanĝoj estas efektive necesaj kaj trovas la plej multe da sendisputaj aprobantoj, kaj por ke la proponoj, nun

ankoraŭ eble erarantaj kaj ŝanceliĝantaj, lumigu la aferon ĉiuflanke kaj donu la puŝon al la ellaborigo de proponoj efektive kaj sendispute utilaj. En la venontaj numeroj ni donos kritikan analizon de ĉiuj proponataj ŝanĝoj en la lingvo kaj nian opinion pri tiuj proponoj kaj ni montros la vojon, per kiuj la ŝanĝoj plej necesaj povos esti enkondukitaj sen ia malutilo al nia afero kaj sen rompado.

Al s-ro P. en Saratov. Mi miras, ke mi jam longan tempon havas de Vi nenian leteron. En la lasta tempo mi ofte rimarkas, ke leteroj skribitaj de amikoj al mi aŭ de mi al amikoj — perdiĝas en la vojo, kaj de tio ĉi venas neatenditaj malagrabloj. Ricevinte de mi nenian respondon je sia vasta letero, la korespondanto ofendiĝas aŭ timas, ke li estas maloportuna al mi per sia skribado, kaj tial li ĉesigas sian korespondadon. Sed se iu ne ricevas de mi respondon, la kulpo plej parte estas ne mia. Per ĉiu, eĉ per la plej sensignifa, letero la amikoj de nia afero alportas al mi ne malkontenton, sed nur plezuron, kaj mi respondas ĉiun leteron, kiam mi nur trovas minuton da tempo. Tial mi nun uzas la okazon kaj petas ĉiujn, kiuj skribas al mi leterojn kaj ne ricevas respondon, — ke ili ne vidu en ĝi ian malĝentilecon aŭ fierecon de mia flanko, sed ke ili diru al si simple: kredeble li ne ricevis mian leteron aŭ mi ne ricevis lian respondon, kaj tial mi skribu al li ankoraŭ unu fojon. Al mi oni povas skribi leterojn eĉ la plej longajn; tamen se mi mem iam skribas tro mallonge aŭ malfrue, oni volu pardoni al mi, ĉar mia tempo estas tre okupita.

Al s-ro P. en Kjaŝta. Mi ŝanĝis mian loĝejon, kaj tial leteroj al mi devas nun esti adresataj ne „Przejazd No. 9“, sed: „Nowolipki No. 21“. Sed la plej bone kaj la plej certe estas adresadi la leterojn ĉiam simple: „Al Dro. L. Zamenhof en Varsovio“. Leterojn kun tia adreso mi ĉiam ricevados la plej akurate, kie ajn ni loĝos.

Anoncoj.

Riĉard Geoghegan

en Birkenhead, Anglujo,

instruas senpage la lingvon „Esperanto“ kaj per la lingvo „Esperanto“ ankaŭ la lingvojn anglan, hindan kaj ĥinan.

Senpage instruas la lingvon Esperantan Vladimir Vladimiroviĉ de Majnov en S. Peterburg.

Mielkukoj Nurnbergaj, plej bona speco asortita, estas forsendataj en poŝtaj paketoj je kosto de markoj 3, 5, 10 — al aliaj landoj. Kun la komisio oni sendu samtempe la sumon en signoj de poŝto aŭ per poŝta mandato.

A. Kleinlein,

Strato de l' Reĝo, 53.

La presejo de W. Tümmel en Nürnberg,

de kiu tiu ĉi gazeto estas presata, rekomendas sin por ĉiuj presaj laboroj.

F. Lorenc en Zbislav, Čáslav, Boh., instruas senpage lingvojn slavajn.

Speziala instruado

de

LIBROTENADO

kaj komercaj kalkuloj

per korespondado en lingvoj: rusa kaj internacia. La rekompenco estas tre modera. Prospektojn kaj provajn leterojn mi sendas al ĉiu, kiu sendos al mi unu poŝtsignon (de ĉia lando).

Mia adreso estas:

Julius Levik

Belaja-Cerkow (Kiev).

G. Zechmeyer en Nürnberg.

Plej granda komerco de signoj de poŝto.

Ĉiuj kasitaj signoj de poŝto estas aĉetataj kaj ŝanĝataj. Alle gebrauchten Briefmarken werden gekauft und umgetauscht.